Esperanto servu la pacon!

A K T U A L E E

8

Monata informilo de Sovetia Esperantista Junulara Movado

N#4(19) Ekstervica eldono

KIAL NI ESTAS ESPERANTISTOJ?
Rezultoj de la sociologia enketado farita en SEJT-XVI (Ivanovo 1974)

I. ENKONDUKO

En SEJT-16 la Ufa E-klubo havis la taskon efektivigi sociologian enketadon. La demandojn por la enketo preparis B.G.Kolker. Poste ili estis ardo pridiskutitaj; ion ni ŝanĝis, ion aldonis. Ŝajnas, ke plejparte la demandoj estas sufiĉe klaraj kaj postulas konkretan respondon. Bedaŭrinde ne ĉiuj. La plej malsukcesa demando demando estis pri libroj. Multaj homoj ne komprenis ankaŭ la do mandojn: Kial vi eklernis E-on?, Kial vi daŭrigas vian okupiĝon pri E-o? Oni respondis ne kial, sed kiel faras tion. Ĉi-eraron faris ne nur komencantoj, sed ankaŭ plursj aktivuloj; do tio signifas, ke denove kulpas ni. Ni devis ielmaniere substreki - kial (sed ne kiel). Ne tro bona ankaŭ estis la demando: Kiel rilatas viaj familianoj, konatuloj al via esperantisteco? Klare, ke diversmaniere. Do ĝuste tiel multaj respondis. Ni devus starigi la demandon, ekzemple, tiel: Kiaj rilatoj dominas?, aŭ ion similan.

Multobligi ĉi-enketon promesis D.Cibulevskij, sed li ne sukcesis pro "teknikaj kaŭzoj". Tamen dum la Konferenco kaj en la tendaro ni sukcesis disdoni pli ol 150 enketfoliojn dank' al senlaca laboro de Natali Stolbun, kiu multobligis la enketon tajpe. Do ni disdonis pli ol 150, sed nur 99 personoj metis en la keston siajn respondojn. Ĉi ankaŭ estas interesa cifero, se pardi, ekzemple pri disciplino en SEJM. Konferencanoj estis ege aktivaj kaj tre rapide plenigis siajn foliojn, sed el tenderanoj respondis nur tre malmultaj. Eble ree ni kulpas mem: ni devus pli bone klarigi al la komencantoj, kion ili devas fari, aŭ simple peti, ke la instruisto de ĉiu lernogrupo tralegu kaj traduku la demandojn dum leciono. Sed nun estas jam malfrue bedaŭri - ni povas fari nur konkludojn por la estonto.

Do estas 99 enketoj: 50 el ili - de virinoj, 49 - de viroj. Ni dividis ĉiujn enketojn je du grupoj: enketoj de aktivuloj (kies E-aĝo estas pli granda ol du jaroj) kaj enketoj de komencantoj (tiuj, kies E-aĝo estas malpli longa ol 2 jaroj). Tiel la grupoj estos nomataj en la tuta posta daŭro. Inter 50 respondintaj virinoj estis 16 komencantinoj, la ceteraj 34 - aktivulinoj. Inter 49 respondintaj viroj estis 8 komencantoj kaj 41 aktivuloj.

La plej granda parto de la respondintoj plenigis siajn enketojn plenserioze, klare kaj konkrete. Ceterej penis ŝerci: iuj gaje kaj sprite, aliaj ankaŭ ŝŝŝŝ sprite sed ne tre gaje, triaj (pardonon!) ne tre sprite. Multaj homoj preterlasis tiun aŭ alian demandon. En 99 enketoj devis esti sume 1584 respondoj, sed estis ĉ. 1480, do ĉ. 100 demandoj restis neresponditaj. Ankaŭ oftaj estas respondoj: "Ne scias", "Ne povas diri", "Dio scias", "Diablo scias" ktp. Nur du demandojn respondis absolute ĉiuj: 1)Kiom da jaroj vi havas?, 2)Sekso. Pri aliaj aferoj, ŝajnas, multaj ne certas. Sed eĉ malgraŭ ĉiuj eraroj de ambaŭ flankoj la ĝeneralaj rezultoj de la enketado estas ege interesaj - multe pli interesaj ol ni povis esperi.

Respondeculoj.

II. KIOM DA JAROJ VI HAVAS?

Ĉi estas la unua demando. Jen kian bildon ni havas:

Aĝotavolo	Viroj	Virinoj
Havas malpli ol 17 jarojn	3	5
De 18 ĝis 25 jaroj	21	35
De 26 ĝis 35 jaroj	16	10
Pli ol 35 jaroj	6	2

Meza aĝo de virino-komencanto estas 22 jaroj,
de viro-komencanto - 24 j.,
de aktivulino - 22 j.,
de aktivulo - 28 j.

Ĉu eblas jam fari konkludojn? Ŝajnas, ke jes. Ĉiam ĉio regas opinio, ke virinoj estas pli konstantaj kaj fidelaj ol viroj: kaj en siaj interesoj, kaj en sia amo, kaj en sia laboro. En la Esperanta mondo ĉio estas inversa: viroj-esperantistoj estas multe pli konstantaj. Se ili serioze ekokupiĝis pri Esperanto - ili daŭrigos. Pri tio parolas ankaŭ la ciferoj de la meza E-aĝo: la meza E-aĝo de aktivulo estas 9 jaroj, de aktivulino - nur 4 jaroj. Kaj jen estas la ĝenerala bildo de E-aĝo:

Aĝotavolo	E-aĝo estas ĝis 1 j.		E-aĝo e. de 1 ĝis 5j.		E-aĝo e. pli ol 5 j.	
	Viroj	Virinoj	Viroj	Virinoj	Viroj	Virinoj
Ĝis 17 jaroj	1	2	2	1	-	2
De 18 ĝis 25j.	7	10	8	22	6	4
De 26 ĝis 35j.	1	3	4	5	11	2
Pli ol 35 j.	-	1	1	2	5	-

III. KIOM LONGE VI INTENCAS AKTIVI EN E-MOVADO?

Tie-ĉi ne nur la ciferoj, sed ankaŭ respondoj estas ege interesaj. Do mi volas komenci de la respondoj, kiujn donas en ordo de plialtiĝo de la E-aĝo de la respondintoj.

R e s p o n d a s a k t i v u l o j :

1. Longe.
2. Ĝis morto, ĉar afero necesa por tuta homaro.*
3. Tutan vivon.
4. Ĝis lasta spiro. Tio estas peceto de mia vivo.
5. Kiom havos eblecon.
6. Ĝis morto, ĉar ne imagas mian vivon sen e-toj kaj E.
7. Kio al mi ekplaĉis, mi malfacile ĵetas. Ni ankoraŭ multfoje renkontiĝos.
8. Nuntempe intencas tute ne restigi tiun-ĉi.
9. Ĝis mi malaktiviĝos.
10. Ĝis tiam, kiam oni agnoskos E-n en nia lando, ĉar post tio movado pereos.
11. Ĝis kiam ne malaperos baroj por plena oficialigo de E. Poste krom ni troviĝos homoj, kiuj movigos la aferon. Sed multaj el ni ne havos tiam intereson daŭrigi aktivadon en la movado.
12. Laŭeble.
13. Mi ne scias kiom longe mi vivos.
14. Se nenio malhelpos - dumvive.

*Pete de la enketadorganizintoj mi konservis la respondojn en "vi—

15. Ne scias firme, sed ĝojnas ke tuten viven.
16. Dume ne tedos aŭ io ne malhelpos. Tia karaktero.
17. Kble dum vivo.
18. Ankoraŭ longtempe.
19. Ĉiam. Volas lerni al homaro.
20. Tre longe, ĉar mi fariĝis ero de la movado.
21. Foriros se, do, nur inter lastaj.
22. La faktoj montros. Tio estas pli bone ol simple babili.
23. Ne povas diri. Ĉu longe bezonos?
24. Tutan viven.
25. Dum tuta vivo. Por mi "foriro el la movado" kaj "fino de la vivo" estas sinonimoj.
26. Ĝis morto kun interrompoj.
27. Ĝis mia fino, ĉar E estas mia pasio, hobio, kaj ebla profesio.
28. Nekompreneble.
29. Ne scias ĝuste, sed dume ne antaŭvidiĝas perdo de intereso por E-laboro, okupo.
30. Eterne. E estas bonega ideo kaj sen ideo ne eblas vivi.
31. Ĝis kiam eni ne forpelos. Ĉar amas E-n kaj E-tojn.
32. Ĉu en SEJM aŭ en SEM?
33. Ĝis lasta vivtago.
34. Ĝis la morto. Mi estas idealisto.
35. Dum mi povas spiri kaj movi mi. Plaĉas.
36. Ĝis estos viva, sed dependo de la ago diversagrada aktiveco.
37. Tutan viven.
38. Jes.
39. Tion mi ne planas. Malfacile estas plani.
40. Ĝis morto.

Do el sperulaj intencas aktivi:

Ĝis la morto	22 homoj	- ĉ. 54%
Longe	5 h.	- ĉ. 12%
Laŭeble, laŭcirkonstance	5 h.	- ĉ. 12%
ne scias, sed esperas, ke longe	7 h.	- ĉ. 17%
Ĝis la venko	1 h.	- ĉ. 2,5%
Ne respondis	1 h.	- ĉ. 2,5%
Sume	41 homoj	- 100%

Bonega aspekto! Eĉ ne unu el la respondintoj intencas forkuri dum proksima tempo, kaj preskaŭ 70% promesas aktivi longe.

R e s p o n d a s a k t i v u l i n o j :

1. Ne scias, sed intencas longe, ĉar ne imagas vivon sen E.
2. Mi ne partoprenas en la movado.
3. Ĝis konservos intereso pri lingvo kaj movado.
4. Se mi ne malhelpos al E - ĝis morto.
5. Por ĉiam.
6. Ne povas ĝuste diri.
7. Ĝis morto.
8. Longe.
9. Dependas de diversaj kondiĉoj.
10. Dezirus longe, timas, ke ne. Mia amiko estas kontraŭulo de E, kaj baldaŭ mi devos elekti.
11. Longe.
12. Aktivi devas junaj, kaj mi jam baldaŭ ne estos juna. (La aŭtoro de ĉi-respondo havas 25 jarojn. - Aŭt.).
13. Laŭ cirkonstancoj.
14. Ĝis tiam, kiam mia koro ne estos sentema al E-familio.
15. Tutan viven.

Iga" aspekto, t.e. ne foriginte la erarojn. - Red.

16. Diadio scias.
17. Dume mi scipovos spiri.
18. Se ne malhelpos familiaj kaŭzoj, kiuj dume ne estas, do longe enkoraŭ.
19. Deflankiĝi jam malfacile.
20. Ne scias, despli ke oni intencas fari SSS-on.
21. Ĉiam.
22. Ne povas diri.
23. Dume mi havas saman intereson por E, kien nun.
24. Ĝis malliberejo.
25. Longe.
26. Longe. Plaĉas.
27. Tutan vivon.
28. Kiel mia edzo.

La ceteraj ne respondis. Ŝajnas, ke ili nem ne scias. Do ĝenerale:

ne scias	4 personoj	- ĉ. 12%
ĝis la morto	7 p.	- ĉ. 20%
longe	4 p.	- ĉ. 12%
laŭcirkonstance	9 p.	- ĉ. 26,5%
jam ne aktivas	1 p.	- ĉ. 3%
ne respondis	9 p.	- ĉ. 26,5%
Sume	34 personoj	- 100%

Ĝenerale promesas longe aktivi 32%.

K i e n d i r a s l a g e k o m e n c a n t o j ?

Viroj:	ĝis la morto	2 personoj	- 25%
	dume agas	2 p.	- 25%
	ne respondis	4 p.	- 50%
Virinoj:	ĝis la morto	4 p.	- 25%
	longe	5 p.	- ĉ. 31%
	ne respondis	7 p.	- ĉ. 44%

Se sumigi ĉiujn respondojn:

intencas aktivi ĝis la morto	6 h.	- 25%
- longe	5 h.	- 21%
-laŭeble, laŭcirkonstance	2 h.	- 8%
- ~~kśńšžźńźś~~		
- ne respondis	11 h.	- 46%
Sume	24 h.	- 100%

Preskaŭ duono promesas longe labori. Ne malbone.

IV. KIOMGRADE VI KREDAS JE VASTA AKCEPTO DE E KIEL INTERNACIA LINGVO?

R e s p o n d a s k o m e n c a n t ŝ ĵ o j :

1. Kredas, ĉar ĝi estas tre grandioza, kompreneblа.
2. Mi kredas.
3. Mi kredas.
4. Mi kredas!!!
5. Mi tre kredas, ke E estos IL.
6. 99%.
7. Mi kredas centgrade. Sed en ĉi jarcento ĝi ne estos akceptata pro multaj kaŭzoj: malamikeco inter landoj k.t.p.
8. ~~E~~
9. Kompreneble, ĝi estos IL.
10. E estos lingvo de paco kaj amikeco en tuta mondo.
11. E devos esti lingvo de paco kaj amikeco en tuta mondo.
12. E estos - "-

13. Mi volas ke tio ĉi estu.
14. Estas necesa komuna lingvo por tuta mondo.
15. Kredas, ke E estos ...
16. Kredas, ke ...

R e s p o n d a s k o m e n c a n t o j :

1. 60%.
2. E estos IL, sed post 15-20 jaroj.
3. Mi kredas.
4. Mi kredas ke E estos nur kiel helpa lingvo
5. En baldaŭaj 80 jaroj tio ne okazos.
6. Mi kredas, ke E entute venkos.
7. Pri tio ne pensis.
8. Mi kredas je la saĝo de homaro. Ni estas unuaj hirundoj de E-printempo.

R e s p o n d a s a k t i v u l i n o j :

1. Mi pensas ke estos tempo kiam preskaŭ ĉiuj povos paroli E, lernos en ĝiuj lernejoj, institutoj.
2. Mi kredas, ke E okupos ĉefan lokon en IL.
3. Mi kredas ke IL fondiĝos sur bazo de E.
4. Devas esti akceptita kiel IL, sed mi mem ne ĝisvivos ĝis tiu tempo. (La respondinto havas 26 jarojn. - aŭt.).
5. Mi tre volus, sed verŝajne tiel ne estos.
6. Je 90% mi kredas, ke IL estos artefarita, je 70% - ke ĝi estos E, je 20-30% - ke ĝi estos artefarita, sed pli bona ol E.
7. Mi kredas ke E disvastiĝos en tuta mondo.
8. Mi tute kredas ke devos esti E en la mondo.
9. E estos IL por ĉiuj, tamen helplingvo; mi ne scias, kiam ĉi-tio estos, sed estos nepre, ĉar longe ekzistas lingvo kaj multe da bonaj homoj lernas ĝin.
10. 70%.
11. E aŭ alia artefarita lingvo estos IL. Naciaj ne taŭgas.
12. Al tutmonda akcepto de E mi ne kredas, ĉar nuna socio estas estas tro merkantila, tro aferema.
13. Ĝi iam estos IL.
14. Neniam estos. Kiel skribita en literaturo ĝi estas lingvo de eŭropaj landoj, kaj IL se estos - estos ne E.
15. Se E kreskos kiel nun - ĝi povos esti IL.
16. Kiel IL? Mi ne tre kredas. Kiel simpla interkomprenilo - cer-te jes.
17. Ne tre kredas pro multaj konservativuloj.
18. E povas venki nur en komunisma socio.
19. 100%. Sed kiam - tio dependas de ni kaj niaj adeptantoj.
20. IL nepre estos, sed tio povas esti iomete modifigita E.
21. Ĝin akceptos por IKongresoj, sportkonkuroj k.t.p. Por scienco ĝi, ŝajne, ne taŭgas, ĉar necesas tro multe traduki.
22. Ne pensis pri tio tute. (Ŝi havas 4 E-jarojn. - Aŭt.)
23. Kredas, ke ĝi nepre estos tutmonda IL.
24. Tio dependas de multaj kaŭzoj, sed iam (ne baldaŭ) povas esti...
25. Tutanime, ĉar mem uzas ĝin por I korespondado kaj parolas kun eksterlandanoj.
26. Ĉ. 30%.
27. Mi kredas kaj esperas, sen tio mi ne okupiĝus pri E.
28. Tute ne.
29. (Konkreta respondo forestas, - Aŭt.).
30. Je 10% scias pli-malpli la situacion de E-movado en la mondo.
31. Kredas.
32. Kredas sufiĉe multe.
33. Vere.
34. Tre kredas pro internaciismaj celoj de la lingvo.

R e s p o n d a s a k t i v u l o j :

1. Utilo de E oni vastos, se ne aperos plej bona sama lingvo.
2. Ege.
3. Nun E ne povas esti internacia lingvo.
4. Tutegrade, se oni ne inventis elektrolumo, malsaĝe estas sidi en mallumo, havante kandelon kaj atendi inventon de e-lampo.
5. Ĝi atingos sukcesojn dum proksimaj 10-20 jaroj.
6. Je 90%. La dua post la gepatra; Sen komuna lingvo ne eblas vivi kaj batali kontraŭ malamikoj.
7. Se ne kredi en tiu afero, entute ĉu indos pri tio okupiĝi?
8. Je 100%, ĉar internacia lingvo bezonatas - tio estas klare; kaj mi ne pensas, ke eĉ nuntempe oni povas krei ion pli bonan ol E por tiu celo. E tute konformas leĝojn de internacia lingvo, ĝi havas ĉiujn ties atributojn.
9. Mi certas ke ne ekzistas ankoraŭ pli taŭga ilo per tiu celo.
10. Mi kredas, ke E ekfloros en la tuta mondo, kaj estas tutcerta pri tio, ĉar la lingvo estas vere facila, riĉa, bela kaj ĝi jam pruvis sian vivkapablon.
11. E. estos akceptata nur tiuokaze, se nia E-movado pruvos ne nur utilecon de E en la socia vivo, sed ankaŭ en diversaj branĉoj de la sciencoj, pere de tradukado kaj farado de fakvortaroj. En la lasta kazo ĉefan rolon ludas nuntempe interlingvistika sekcio ĉe Akademio de Sciencoj de USSR kaj alilande.
12. Depende de cirkonstancoj kaj de la auskultanto.
13. Mi kredas ke E venkos.
14. Mi kredas, ke oni akceptos E-n, sed kiam - ne scias. Kial? Ĉar homaro ankoraŭ ne maturiĝis por tia granda ideo.
15. Dum proksimaj dek tagoj ne kredas tute.
16. Mi kredas, ke se E mem ne estos int. lingvo, ĝi helpos fari int. lingvon.
17. Tutanime mi volos kredi je la plej vasta akcepto de E. Estas bonega ideo por saĝaj homoj.
18. Mi vidas negrandaj sukcesoj de E.
19. Firme kredas. Bona ideo fin-fine venkos.
20. Malfacila demando. Por respondi oni devas konsideri multajn momentojn: institutojn, logikon, filologiajn faktorojn.
21. Dum proksimaj 20-25 j. vasta akcepto de E. ne okazos (Kial: observas movadon dum 6 j.).
22. Optimisme (sufiĉe), tamen necesas ne nur kredi, sed batali.
23. Je 50%.
24. Je akcepto de E almenaŭ kiel pratipo de IL mi plene kredas. Aliaj samtaŭgaj vojoj ne estas.
25. Mi kredas tiomgrade, kiomgrade mi kredas je bona prudento kaj morala sano de la homaro. Homaro devas solvi la lingvan problemon per la plej racia kaj justa maniero. Tio, laŭ mi, okazos post ne malpli ol unu ~~jarcento~~ generacio.
26. Certgrade. Pro tamenaj sukcesoj en nia E-movado.
27. Se mi ne kredus, verŝajne, mi forlasus mian pasion.
28. Esperanton akceptos ĉiuj, krom mia bopatrino!
29. Tio dependas de tutmonda politiko - kredas kiel je paco.
30.(Respondo forestas, - Aŭt.).
31. Dume tiu-ĉi ebleco ne malaperas.
32. Je 52%. Ĉar E estas la plej taŭga por tio, sed homaro ne ĉiam akceptas la plej taŭgajn decidojn, do 50% al 50%. Du mi aldonas pro persona amo de E.
33. E kun certaj korektŝanĝoj estos akceptita kiel IL (dua post la gepatra) post 50 jaroj. Sen la komuna lingvo ne eblas plua progreso de la homaro.
34. E estos nepre akceptita vaste kiel IL, ĉar sen ĝi ne eblas

sukcese superi lingvajn barojn.
35. Tutanime. Laŭ marksista teorio.
36. Je 80%. Ne en proksima tempo. Sed post multaj jaroj eble sciencistoj elpensos novan lingvon.
37. Multe kredas, ĉar la tempo laboras por IL.
38. Ĉar mi tion deziras, firme.
39. Kredas.
40. Ne kredas. Homaro ne estas matura por tio.

^ Ĝ e n e r a l a b i l d o :

	Komencantoj		Aktivuloj		Sume
	Viroj	Virinoj	Viroj	Virinoj	
Kredas	5h.(62,5%)	13h.(81%)	18h.(44%)	13h.(38%)	49h.(49,5%)
Preskaŭ kredas	-	-	7(17%)	7(21%)	14(14,1%)
Dubas	2(25%)	3(19%)	13(32%)	11(32%)	29(29,3%)
Ne kredas, ne scias	1(12,5%)	-	2(5%)	3(9%)	6(6,1%)
Ne respondis	-	-	1(2%)	-	1(1,0%)
Sume	8(100%)	16(100%)	41(100%)	34(100%)	99(100%)

V. SE NE KREDI JE VASTA AKCEPTO DE E KIEL IL, ĈU INDAS PRI ĜI OKUPIĜI?

Tiel skribis en sia enketo unu aktivulo. Tamen proksimume duono de la respondintoj aŭ ne tre kredas aŭ tute ne kredas. Sed ili daŭrigas okupiĝi pri E kaj, kiel ni jam vidis, ne intencas forlasi la aferon en la proksima tempo. Rigardu ni enkoraŭ du demendojn el la enketo.

KIAL VI EKLERNIS E-on?

R e s p o n d a s k o m e n c a n t i n o j :

1. Min interesas vivo, homoj kaj artoj en diversaj landoj.
2. Tre volas paroli tiun lingvon.
3. Volas posedi IL-n.
4. Volas posedi IL-n.
5. Multe pri ĝi audis.
6. Por korespondi kun homoj de diversaj nacioj.
7. Mi tre volonte korespondas.
8. Min interesas ĉi-lingvo.
9. Hemstare
12. Mi ŝatas tion originalan belan lingvon.
13. Tre interese.
14. Ĉar mi mem estas lingvoinstruisto.

KIAL VI DAŬRIGAS OKUPIĜI PRI E?

1. Plaĉas E-lingvo.
2. en la grupo
3. en la grupo
4. en la grupo
5. Ĉar al mi plaĉas E-n lingvon.
6. Plaĉas.
7. Unue - ŝatas korespondi, dueakiris bonajn geamikojn, partoprenis SEJT-15 kaj jam ne imagas vivon sen E, SEJTaj kaj geamikoj.
8. Pensas, ke tio estas grave.
9. Ĉar volas pli multe ekscii kaj akiri novajn geamikojn de la tuta mondo.
12. -
13. -
14. Volas scii la lingvon profunde kaj paroli.

R e s p o n d a s k o m e n c a n t o j :

1. En klubo.
2. Ĉar ĝin eklernis multe da bonegaj homoj.
3. -
4. Volas paroli kun tuta mondo.
5. -
6. Tre volis.
8. Ekplaĉis ĝia strukturo kaj precipe bonega vortgrado. Post ni ensamiĝis en nema ideo de IL.

1. En tendaro.
2. Ĉar E estas bonega lingvo.
3. E plaĉas al mi.
4. Volas paroli perfekte E.
5. Vizitis kluben.
6. Memstare.
8. Ĉar ĝi estas la plej bona lingvo el 8 kiujn mi posedas, ĉar en ĝi mi vidas estontan lingvon de la mondo.

R e s p o n d a s a k t i v u l i n o j :

1. Ŝatas lingvojn, korespondadon, vojaĝojn. E donas ĉion.
2. El sciinde.
3. Ŝatas korespondadon, vojaĝojn, renkontiĝojn kun interesaj homoj - kaj kredas ke en estonto estos IL, simila al E.
4. Pro lingvinteresо.
5. Volis scii kiel sonas E.
6. Interesigas pri IL.
7. -
8. Por korespondi.
9. Plaĉas lingvo, korespondado. Amikeco inter popoloj helpos batali pro paco.
10. -
11. Volis ekscii ankoraŭ unu lingvon.
12. Por korespondo.
13. -
14. -
15. Por pli diversaj scioj kaj por eklerni ankoraŭ unu lingvon.
16. -
17. Por erudicio.
18. Ekplaĉis.
19. Interesiĝas pri lingvoj, pri vigla vivo de junularo kaj vojaĝoj.
20. Mi tre ofte forlogiĝas.

1. -
2. Mi ne deuris okupiĝon pri E.
3. Estas interesо.
4. La afero ekzistis pli interesa kaj disvastigata ol mi imagis.
5. Ekplaĉis tendaroj kaj ke homoj de diversaj nacioj povas paroli inter si.
6. Por helpi fari E-n - IL.
7. La ideo de la lingvo interesas min.
8. Plaĉas tendaroj, ebleco konatiĝi kun eksterlando kaj veturi tien.
9. Opiniis, ke devas fari ion post la rondeto.
Volas partopreni en la E-movado;
10. -
11. Mi estiĝis adepto de E.
12. Esperantismo estas nobla kaj neordinara ideo; esperantistoj ankaŭ estas neordinaraj (kvankam ne ĉiam noblaj).
13. Plaĉis ideo, volas akiri novajn geamikojn, ekscii pri E-movado.
14. Plaĉas lingvo kaj tendaroj.
15. Volas pri profunde eklerni lingvon kaj helpi al E-movado.
16. Pro pure lingvista interesо.
17. Kaŭze de estimo al B.Kolker.
18. Ne scias.
19. Deziras posedi lingvon kaj instrui ĝin.
20. Plaĉas E-amikojn kaj ke oni parolas E en multaj landoj.

21. Interesiĝas pri lingvon.

22. El lingvistika intereso.
23. Interesiĝas pri diversaj lingvoj.
24. Profesia intereso + perspektivo viziti tendarojn.
25. -

26. Ĉar mi opinias, ke ĉi-lingvo estas bezonata, kaj ĝi ekplaĉis al mi.
27. Interesas lingvo, due - ĝi estas IL. Mi volas havi geamikojn, vojaĝi kaj ekscii multan novan, paroli E.
28. Ĉar kurson gvidis ege estimata de mi homo.
29. -

30. Deziro scii ankoraŭ unu lingvon; ĝi estas nekutima lingvo.
31. -

32. Ĉar volis la patro.
33. Interesiĝas pri IL.
34. Ĉar amis mian estontan edzon.

21. Plaĉas E kiel IL, alian mi dume ne vidas.
22. Renkontis interesajn homojn.
23. Legas librojn kaj korespondas.

24. №5 + sen E vivo ŝajnas malplena iom.
25. Ĉar estis tre bona junulara kolektivo, kun kiu mi bone amikiĝis.
26. Plaĉas ideo, movado, homoj en la movado.

27. Por ne forgesi E-n, por partopreni SEJTojn kaj renkontiĝojn.

28. Por ne forŝimi; pro E-amikoj.

29. En E mi trovis pli multe da avantaĝojn ol en aliaj miaj okupoj.
30. -

31. Pro la ideo mem, pro interesa perspektivo, pro bonegaj homoj.
32. Plaĉas.
33. Plaĉas E-n.
34. Ĉar amas mian edzon.

P a r o l a s a k t i v u l o j :

1. Plaĉas ideo.
2. -
3. Ĉiuj komencis lerni ĝin, mi ankaŭ.
4. Volis ekprovi, kaj poste okazis malfrue - mi amiĝis lingvon.

6. De komenco pro intereso. Ĉefa kaŭzo - senilusiiniĝo en komsomola laboro.
7. Interesiĝas pri lingvoj.
8. Komence nur pri scivolemo.
9. Estis interese, kio ĝi estas, kaj fortelspezoj negrandaj.
10. Tio helpas en studado de fremdaj lingvoj kaj en legado de fremdlingvaj revuoj laŭ mia specialeco.
11. Min forte enfluis la esprimo "IL" kaj ebleco paroli kun tuta mondo.

13. -

14. -

15. Dum eklerno nur por scii fremdan despli unikan kaj facilan kaj ankaŭ por bone ripozi en interesa kompanio.

1. -
2. -
3. Dio scias.

4. Plaĉas ideo.

6. Al E apartenas tuta mia vivo.

7. №5.

8. Komprenis ideon.
9. Interesaj aferoj, interesaj homoj kaj amikrilatoj.
10. Ĉar eksterlande trovis samfakulon, kiu sendis al mi libron, tradukitan en E. En E mi vidas estontan lingvon de tekniko kaj scienco.
11. Plaĉis E kaj ĝi vere povas helpi elstudi aliajn fremdajn lingvojn.

13. Interesa kaj grava estas mem ideo.
14. Mi ŝatas esti strangulo kaj estis interese.
15. Bone por ĝenerala klereco por animo kaj sentoj.

16. Ni scivolemo.
17. Por ekkoni la mondon.

18. Plaĉas ideo.

19. Por mi ĝi estas solvo de eksterlandaj kontaktoj.
20. Por ekscii lingvon (por aliaj mankas tempo); ĝi interesas min.
21. Plaĉas mem ideo de IL.

22. E eksplaĉis al mi kiel lingvo kaj humana ideo.

24. Pro la ideo de kunfratiĝo kaj komunikiĝo.
25. Pro senkonscia, preskaŭ instinkta interna strebo.
26. Pro scivolemo.
27. Ŝajnas estis subkonscia emo.

29. Ŝatas studi (posedi) lingvojn.
30. Interesiĝas pri fremdaj lingvoj.
31. Por interparoli kun amikoj nekompreneble por ĉirkaŭantoj.
32. Volis interŝanĝi poŝtmarkojn kun eksterlando.
33. Ekvidi eblecojn de E kiel IL.
34. Por korespondi kaj kolekti PM kaj BK de eksterlando.
35. Pro interesо.
36. Por interŝanĝi poŝtmarkojn.

38. Flamiĝis pri la ideo de lingvo internacia
39. Ĉar deziris disvastigi la lingvon.
40. Al mi ŝajnas ke E estas estonto de mondo.
41. -

16. Ĝi ekinteresigis min.
17. Por disvastiĝi E-n inter sefaj homoj.
18. Kredas al ideo; kaj bone ripozas.
19. Por helpi al aliaj homoj trovi solvon de IL.
20. Pro interesо, scivolemo, korespondo, renkontiĝoj, tendaroj.

21. Sentas, ke movado bezonas, ĉar homaj mankas.
22. Ĉar ĝi estas proksima al mia menso kaj koro.

24. Necesa, grava afero.

25. Ĉar ne estas kaŭzoj por forlasi ĝin.
26. Komprenis ideon.
27. Plaĉas lingvo kaj ĝiaj eblecoj. Post unua tendaro komprenis, ke ne forlasos ĝin.

29. Imponas korespondado.

30. E-movado allogas min pro ĝia intereseco.
31. Komprenis ideon.

32. Diablo scias...
33. Pro utilo: korespondado, eksterlandaj libroj ...
34. Havis 40 korespondantojn, poste ekinteresiĝis pri movado.
35. Al mi plaĉas.
36. Rapide eklernis, kaptis ideon, volas labori por bona ideo.

38. Opinias, ke E bezonas vastan apogon.
39. Ĉar mi ĝis nun konservas bonan opinion pri ĝi.
40. Mi volas ekstudi tiun lingvon.

41. E-laboro estas tre grava por komunisma edukado de junularo en spirito de vera internacionalismo.

Kiel ni vidas, pro la ideo deĵrigas E-laboron 21 personoj el 99. Kaj eĉ el tiuj 21 preskaŭ duono aldonas, krom ideon aŭ korespondadon, aŭ lingvistikan intereson, aŭ tendarojn, aŭ interesojn homojn en la movado. Nekompreneble. La ideo, certe, ege gravas. Nur, se la ĝenerala celo estas nobla, ĝi povas allogi bonajn homojn. Pri tio skribis 56 homoj - pli ol duono, kaj ankoraŭ proksimume 25% menciis bonajn homojn en aliaj respondoj (№№4, 5, 7, 8, 10, 11, 14, 15 - demandoj). Do sume pri bonaj homoj skribis ĉ. 80%. Ankaŭ kompreneble. Dum konferencoj kaj disputoj multfoje estis substrekite, ke la faktoro de personeco ege gravas. Gravas, kiu gvidas kurson, kiu venas al la klubo, kiu prezentas niajn interesojn ĉe oficialaj instancoj, gravas, de kiu ni ekaŭdis je la unua foje pri E - ofte ĝuste de tio dependas, ĉu ni volas studi ĝin aŭ ne.

Sumaj rezultoj aspektas tiel:

Kialoj	Kial eklernis?		Kial daŭrigas?	
	Viroj	Virinoj	Viroj	Virinoj
Por praktika uzado (korespondado, Int-kontaktoj)	4h.	10 h.	5 h.	6 h.
Scivolemo	4	3	1	-
Lingvistika intereso	12	20	4	6
Ideo	8	2	14	7
Plaĉas homoj, tendaroj, vojaĝ.	7	9	18	22
Ne scias, ne respondis	12	14	13	10
Aliaj kaŭzoj	5	3	2	-

Kaj proskaŭ ĉiuj plej interesaj homoj de nia Movado kunvenas en E-tendaroj. Sajnas, ke ĝuste pro tio tendaroj ankaŭ estas menciitaj multfoje en la enketoj. Ĝuste post tendaro komencanto aŭ progresanto iĝas vera aktivulo, ĉar nur en tendaro eblas ricevi la plej plenan impreson kiel pri E kaj Movado, tiel ankaŭ pri homoj, ligitaj kun ĉi afero.

Iom pli malofte, sed ankaŭ multfoje, estas menciitaj vojaĝoj kaj bona ripozo. Ĉu malbone estas, ke iuj homoj antaŭ ĉio vidas en E nur amuzan parton? Mi pensas, ke ne. Homo povas ne esti idea E-isto, sed, se li deziras partopreni tendarojn kaj renkontiĝojn, li devas akiri tiun rajton per sia laboro. Kaj ofte okazas, ke tiuj homoj laboras eĉ multe pli aktive ol veraj ideaj E-istoj. Ankaŭ ofte okazas, ke homoj komencas de amuzo kaj venas al la ideo.

Sed finfine - la ciferoj montras, volas ni tion aŭ ne - ideaj E-istoj ne tre multas inter ni (eĉ inter aktivuloj: malpli ol duono).

Tamen ĝuste ili respondecas pri tio, ke la Movado entute havu certan direkton, konkreton celon.

VI. ĈU VI MULTE LEGAS EN E?

Tendaroj, renkontiĝoj, vojaĝoj, ripozo - tio estas jam praktika uzado de E. Pri praktika uzado de E estis ankaŭ du apartaj demandoj en la enketo:

№13. Kiuj libroj al vi eksplaĉis?

№12. Kiom da korespondligoj kun eksterlando vi havas?

Do unue, pri libroj. Mi jam menciis, ke la demando estis tute neklara: nekompreneble, ĉu temis pri libroj en E aŭ pri libroj ĝenerale. Kaj krom tio okazis, ke plejparte oni respondis ne al "kiuj libroj eksplaĉis?", sed al "kiujn E-libroj vi tralegis?". Tamen rigardante la respondojn , eblas fari jenan konkludon: ĝenerale E-istoj tute malmulte legas en E. 12 komencantoj (duono) respondis, ke ankoraŭ tute nenion legis. El 75 aktivuloj nenion legis aŭ ne respondis 19 homoj. Eble al ili simple eksplaĉis eĉ ne unu libro? Sajnas, ke ne, ĉar al kiu nenio eksplaĉis, tiu ĝuste skribis. Kaj ĝenerale, ĉu povas esti, ke homo multe legas, sed nenio al li plaĉas? Kaj sufiĉe multaj respondis proksimume tiel: "Okupacio", sed plu ni nenion legis." aŭ: "Mi tralegis ankoraŭ nur unu libron: "Kuŝanta tigro".

Kion ni legas? Bedaŭrinde, en ĉi-afero la ĉefan rolon ludas ne niaj gustoj kaj interesoj, sed la ebleco trovi tiun aŭ aliun libron. Eble ĝuste pro tio la unuan lokon okupis sendube "Okupacio" de E.Kru-

sten. Ĉu vere, ke ĝi estas la plej interesa libro? (Ĝin nomis 11 homoj.) Pli ĝuste, la plej trovebla. Poste sekvas:

"Kuŝanta tigro" de Lilli Promet	9 homoj
"Nude inter lupoj" de Bruno Apitz	6 homoj
"Quo vadis?" de H.Sienkevič	6 homoj
"Faraono" de B.Prus	3 homoj
"Bofilino"	2 h.
"Kruko kaj Banko el Bervalo"	2 h.
"Kredu min, sinjorino!"	2 h.

Po du homoj nomis ankaŭ PIV-on kaj "Fundamentan krestomation" de L. Zamenhof, aliaj titoloj aperis po unu fojo.

17% da respondintoj skribis, ke ili preferas ne belartan legadon, sed librojn p ri E, pri Movado, lernilojn, prilingvistikajn kaj interlingvistikajn librojn. 5% preferas versojn (ekskluzive virinojn).

Sume 99 homoj donis 43 librotitolojn. Ni 99 homoj ĉ. 30% tute ne legas; ankoraŭ proksimume 20% skribis, ke legas ege malmulte aŭ, ke tralegis nur unu libron. Ŝajnas, ke proksimume duono el ni ne tre interesiĝas pri E-literaturo.

Nun pri korespondado.

	Aktivuloj		Komencantoj		Ĝenerale
	Viroj	Virinoj	Viroj	Virinoj	
Ne respondis	3h.	2h.	1h.	6h.	12%
Ne korespondas	8	7	2	3	20%
Havas 1 koresp. ligon	8	3	2	2	15%
" 2 " "	1	9	-	1	11%
" 3 " "	1	4	1	-	6%
"4 4 " "	1	2	1	2	6%
" 5 " "	3	1	-	1	5%
" 6 " "	1	1	-	-	2%
" 8 " "	1	1	-	-	2%
" 9 " "	1	1	-	-	2%
" 10 " "	3	-	-	-	3%
" 12 " "	2	-	-	-	2%
" 14 " "	1	-	-	-	1%
" 15 " "	1	-	-	-	1%
" 20 " "	1	-	-	-	1%
" 22 " "	2	-	-	-	2%
" 23 " "	-	1	1	-	2%
" 40 " "	2	-	-	1	3%
Ĝenerale	40	32	8	16	

S u m e :

Ne respondis kaj ne korespondas .	32%
Po 1 korespondligo havas	15%
De 2 ĝis 10	37%
De 11 ĝis 20	5%
Pli ol 20	7%

Jen kion ni povas diri pri praktika uzado de E.

KIEL RILATAS AL VIA ESPERANTISTECO VIAJ FAMILIANOJ, KONATULOJ?

Sed antaŭ ol esplori rilaton de familianoj al E rigardu ni la demandon Nr3: "Ĉu vi havas familion?"

	Komencantoj	Aktivuloj	Komencantinoj	Aktivulinoj
Havas	2	22	4	6
Ne havas	6	19	12	28

El viroj havas familion 24 homoj, ne havas - 25, proksimume duono je duono. El virinoj havas familion 10, ne havas - 40, proksimume 1:4. Sume 34 personoj havas familion, 65 - ne havas (1:2). (La ciferoj ĉajnas esti ne tute ĝustaj: iuj homoj ne komprenis, ke temas nur pri propra familio, kaj skribis, ekzemple:"Jes, havas patrinon kaj fratinon.)

Kiel ni vidas el viroj aktivuloj familiaj kaŭzoj ne ĉiam malhelpas, sed virinoj lasas E-on plejparte ĝuste pro familiaj kaŭzoj.

Kaj nun kiel rilatas al via esperantisteco viaj familianoj, konatuloj?

	Aktivuloj	Aktiv-inoj	Komencantoj	Komenc-inoj	Sume
Bonege	1	2	1	2	6%
Bone	11	11	2	12	36%
Ne malhelpas	4	6	1		11%
Ne serioze	5	3			8%
Ne respondis	2	1			3%
Malbone	3	2	1	1	7%
Diverse	15	9	3	1	28%

Jen estas opinio de la popolo. Plejparte ne malbona tamen ne tre serioza. Oni ne malhelpas, sed mem ne volas lerni E-on.

Kaj jen estas opinio de oficialaj instancoj, kiel ili rilatas al Esperanto.

Ne scias	9	Ili nenion scias	5
Ne respondis	9	Sufiĉe bone	11
Tre malbone	3	Helpas	9
Ne tre bone	3	Diverse, ne tre bone	9
Bone	21	Tre bone	2
Neŭtrale (ne malhelpas)	4	Aliaj respondoj	2
Malbone	12		

Eblas vivi tamen!

VIII. FUNKCIAS KLUBO KAJ EĈ NE MALBONA!

Je la demando: Ĉu en via urbo funkcias E-klubo?- 88 homoj respondis, ke funkcias, 4 - ke estas grupo, 5 - ke nenio estas, 2 homoj ne respondis. Kiel ni vidas, temas preskaŭ ekskluzive pri kluboj. Vere, en E-movado kluboj ludas grandegan rolon. Fakte, la tuten E-laboron faras ĝuste kluboj. Pro tio ege gravas ankaŭ demando pri kluba vivo, pri plibonigo de kluba laboro. Kiel vi proponas plibonigi kluban laboron? - tio estis demando N#10. Jen estas la respondoj.

R e s p o n d a s k o m e n c a n t i n o j :

1. Necesu partipreni en spektakloj esperante(tio estas interese).
2. Ne scias.
3. Necese grande paroli pri E.
7. Ĉiuj klubanoj devas havi okupon, gravan taskon laŭ sia deziro kaj scipovo.
9. Devas plifortigi kluban agadon per disciplino.

R e s p o n d a s k o m e n c a n t o j :

1. Prepari taskojn por ĉiuj unoj kaj kontroli laboron kiun ili preparas.
3. Devas esti interesaj kunvenoj.
4. Necesas eldoni pli multe da esperantaĵojn kaj pli multe esperantradii.
5. Esti aktivaj.
6. Pli bone rilati al junularo(kiuj ankoraŭ ne tre bone parolas).

8. Necesas aranĝi planetan de SEJM leterkrenonadon - ĝi estos reala paŝo al oficialiĝo de E.

R e s p o n d a s a k t i v u l o j :

2. Pli grandan propagandon.
3. Ĉiuj plibonigoj jam estis akceptitaj dum konferenco.
4. Likvidi malfacilaĵojn.
5. Dum neoficialigita situo neniaj ŝanĝoj helpos.
6. Al ĉiuj - propran ejon, oficialiĝo kaj la plej grandan kvanton eblo junaj kaj sindonaj homoj.
7. Unue "cementi" klubanoj kaj poste pensi pri pli grandaj rezultoj.
8. Plej parte homoj vizitas E-klubojn ne pro ideo emuzo, disiĝi de diversaj zorgoj ktp. Ne ĉiuj komprenas, kion signifas nocio - klubo, E-klubo. E-klubo havas klaran celon, ... (nedeĉifrebla - Aŭt.).
9. Rigardu protokolojn de ĉi-konferenco.
10. a)Klubanoj devas forte amikiĝi, aŭ per komuna laboro, aŭ per komuna ripozo, aŭ ambaŭflanke
b)plivastigi klubajn ligojn kun eksterlando
c)propagandi E-n en sia urbo, regiono laŭ plano, registrita en koncerna instanco - vojo por oficialiĝo.
11. Pli multe okupiĝi pri la lingvo mem ol pri poentoperlaboro. Nia lingvonivelo ne estas alta. Des pli malbone, se ni eĉ tiun facilan lingvon posedas ne plene.
12. Repritaksi kion oni agnoskas kiel utilendaĵo.
13. Estis dum konferenco.
14. Sendece pliinteresigi laboron.
15. Por ĉiu klubo rekomendi serĉi sekvan kompleton de homoj (aŭ unu universalan): organizanto (idealo ĝia) turisto, gitaristo, pedagogo.
16. Interesigi homoj. Doni taskoj laŭ deziro kaj sen.
17. Necesas kapablajn instruistojn kaj bonajn lernilojn por komencantoj.
18. Plivastigi renkontiĝojn de e-toj, plibonigi aperado kaj enhavo de societaj E-ĵurnaloj.
19. Ne vidas.
20. Dependas de tio, pri kiu klubo temas.
21. Proksimigi klubon vivon al ripozdoma reĝimo.
22. Tre gravas sperta kaj entuziasma gvidanto, kaj pli helpi al komencantaj klubo.
23. En nia klubo vi ĉiam riceveas amikan helpon.
25. Lukti kontraŭ krokodiladoj fare de spertuloj, eviti malproksimajn de E temojn, doni ĝis al ĉiuj interesajn por ili taskojn, uzi ĉiujn atingeblajn formojn de propagando.
26. Plia respondecemo de klubanoj, oficialiĝo estas bezonataj.
27. Materialoj de konferenco.
28. Plibonigi laboron kun novaj e-oj.
29. Pli multe labori konkrete: per E. Aranĝi tiujn entreprenojn, kiuj plaĉus al popolamaso, samtempe al instancoj.
30. Eldoni almenaŭ tajpe metodikan lernilon, interesan por progresantoj.
31. Diversaj por diversaj kluboj.
32. Labori de E-klubo devas esti interesa, kaj ne nur por ties anoj.
33. Aktivigi klubanojn, doni al ili laŭpovajn individuajn taskojn, instigi aktivulojn viziti renkontiĝojn, tendarojn.
34. Aranĝi la plej vastan kluban kaj personan korespondadon.
35. Plibonigoj venas mem, necesas nur sindone labori.
36. Altigi la nivelon de lingvoscio kaj movadoscio.
39. Fari la gvidadon pli profesinivela.
40. Pli multe propagandi pri lingvo.
41. Eduki instruistaron (kiel faras B.Kolker).

R e s p o n d a s a k t i v u l i n o j :

2. E-klubo laboras tre bone.
3. Pli ofte organizi renkontiĝojn kun eksterlandanoj en Sovetio kaj eksterlande.
4. Taskojn al ĉiuj, konsili, kion legi, kion traduki. Sciigi pri E-gazetaro. Aparte: sciigi novulojn pri strukturo de E-movado, pri laboro de diversaj kluboj.
5. Pliboniĝi ... pri E en ĉiuj kluboj en tuta Sovetunio.
6. Teni ligojn de komitato de SEJM kun E-kluboj laŭ jena skemo:

7. Kontakti kun fremdlandulo j.
8. Montri ke E certe vivas.
11. Pli bone organizi laboron kun progresantoj.
13. E-oj devas esti pli obstinaj kaj laboremaj.ol
14. Pli aktivigi kaj junuligi la klubon.
15. Pli multe labori kun komencantoj.
16. -
17. Pli multe propagandi.
18. Ne nur amuziĝi, sed labori: traduki, agi politike.
19. Ni devas havi certan programon, bone scii niaj taskoj.
20. Necesas oficialiĝo.
21. Por ĉiuj diversaj, al kiu kio ne sufiĉas.
23. Kldoni pli multe da libroj en E, kio e-toj priskribu sian klubon laboron.
24. Pliaktivigi kaj plinombrigi la klubon, fari fakojn, oficialiĝi, akiri ejon. Ĉefa kaŭzo de sukceso - bona organizanto.
25. Taskojn - al ĉiuj laŭ ilia deziro.
26. Taskojn al ĉiuj.
27. Interesaj prelegoj, diafilmoj.
30. Aktivigi progresantojn.
31. Aktivigi per kolektiva laboro.
32. Multe kanti.
33. Aktivigi fakan laboron.
34. Kreskigi bonajn instruistojn.

S u m o :

- Sendas al la materialoj de la Konferenco	4 h.
- Necesas oficialiĝo	5
- Homoj devas esti junaj kaj aktivaj	8
- Necesas amikiĝi	2
- Vastigi kontaktojn kun eksterlando	4
- Pli bone propagandi E-on	3
- Altigi la lingvan nivelon	2
- Taskojn - por ĉiuj	8
- Preparadi instruistojn kaj lernilojn	4
- Devas esti bona gvidanto	3
- Pli multe labori kun novovenintoj	5
- Dependas de klubo	3
- Ne respondis	12

KION FARI, POR NE PERDI KURSFININTOJN?

Demando, ligita kun la antaŭa.

R e s p o n d a s k o m e n c a n t o j n :

1. Kiam kursfininto alvenas al la klubon, necesas okupi lin.

3. Interesigi lin pri E.
4. Plibonigi propagandon.

6. Amikiĝi ilin.

8. Instrui ne nur lingvon, sed ideon. Instrui tiujn, kiuj povas tiun ideon akcepti.

R e s p o n d a s k o m e n c a n t i n o j n :

1. Ne scias.
2. Plibonigi laboron.
3. Plibonigi agitadon.
4. Necesas aktive korespondi kun eksterlando.
5. Bone alligi.
6. Necesas ilin tuj sendi en tendaro, interesigi ilin pri kluba laboro, serĉi talentojn inter ili.

8. Necesas korespondi.
9. Varbi al laboro en E-klubo.
10. Varbi al laboro en E-klubo.

12. Agiti pli multe.

14. Varbi al laboro en E-klubo.
15. Varbi al laboro en E-klubo.

R e s p o n d a s a k t i v u l o j n :

1. Donadi interesan laboron, taskon.
2. Necesas ke ili partoprenu E-tendarojn.

4. Havigi bonajn lernolibrojn, instruistojn, vortarojn kaj prikonstrui animon de kurso.
5. Tion-ĉi ne necesas timi, ĉar restas ĝuste veraj fidindaj E-istoj.
6. Se ili jam certe interesigis pri E - ili ne perdiĝos.
7. Cimenti kurson, enkonduki novadajn elementojn.
8. Ne devas esti granda paŭzo inter elementa kaj progresanta kurso.
9. Tuj doni alili taskojn, atentigi ilin pri lingva perfektiĝo.
10. Interesigi ilin pri vasta korespondado kaj bruligi en ili deziron paroli en fremda lingvo.
11. Akordigi ilin.

15. Ne scias.
16. Necesas kapablajn instruistojn kaj pli bonaj lernolibroj por komencantoj.
17. Renkontiĝoj, similaj al SEJT.
18. Abonigi, korespondigi, partoprenigi en renkontiĝoj.
19. Veturigi ilin en tendaroj.
20. Por ĉenoj alligi al klubejo (ĉerco).
21. Pli interesigi ilin per sia ekzemplo.
22. Dum 7 jaroj mi audis multe. Kiuj alvenis en klubo trovi paron por la vivo, do bezonas nepre edziniĝi.

24. Esti al ili pli atenta kaj progresigi ilin.
25. Interese gvidi kursojn. Rekomendi korespondadon kaj tendarojn, kaj por komenco - regionajn renkontiĝojn.
26. Necesas havi bonan programon de E-kursoj.
27. Amikigi ilin kaj proponi pĉaĉajn taskojn.
28. Eldoni metodikon, almenaŭ tajpe.
29. Solan: havi bonan modelan prezidanton. Ekzemplo: Gončarov (needziĝinta) + Ŝilas.
30. Trovi por ili taskon aŭ bolan esperantis(in)on.

31. Taskojn al ĉiuj.
32. Interesigi pri I-korespondado.
34. Instrui al ili ideon. Interese instrui.
36. Flamigi per allogaj kaj atingeblaj perspektivoj.
37. Taskojn al ĉiuj poetape.
38. Konvinki en necesecon studi E-on, allogi.
39. laborigi ilin.

R e s p o n d a s a k t i v u l u i n o j :

1. De komenco ne necesas ilin timigi, parolante pri tro seriozaj aferoj.
2. Ne scias.
3. Klubanoj devas pli ofte renkontiĝi.
4. Iu devas pri ili okupiĝi.
5. Nepre diri gravan celon de E.
6. Ŝarĝi ilin per E-laboro.
7. Se ili havas taskon, ili ne perdiĝos.
8. Interesigi ilin pri movado. Doni al ili taskojn.
9. Korespondigi.
11. Plani laboron laŭ iliaj preferoj.
12. Necesas senfine ilin amuzi.
13. Doni pli multe da atento al ili.
14. Amuzi ilin.
16. Ili ĉiuj devas sufiĉe bone paroli.
17. Ne permesi knabinojn edziniĝi.
18. Ne scias.
19. Pli bone rakonti pri E-movado.
21. Pli ofte kolektiĝi, fari marŝojn eksterurbe, vojaĝojn, veturigi ilin en tendaroj, konstrutaĉmentoj.
23. Korespondi kun ili.
24. Interesigi ilin pri diversaj aranĝoj, venigi al tendaroj, renkontiĝoj. Interese organizi kursojn.
25. Klopensi por ili interesan komunan aferon.
26. Fari por ili apartan klubon (ŝtupeton).
27. Devas esti bona instruisto kaj interesaj lecionoj.
29. Dependas kaj de klubanoj, kaj de finintoj.
30. Instrui ne nur lingvon, sed ankaŭ movadajn problemojn.
31. Preni en tendaroj kaj renkontiĝoj, kontakti kun eksterlando.
32. Esti pli amikecaj.
33. Interesigi ilin.
34. Per internacia korespondado kaj praktika aplikado.

Sumigu ni ĉiujn proponojn:

kion proponas	Komencantoj		Aktivuloj		Sume
	Viroj	Virinoj	Viroj	Virinoj	
Venigi al tendaroj, renkontiĝoj	-	1	5	3	9%
Pli bone instrui	-	-	5	2	7
Amuzi ilin	-	-	-	4	4
Doni al ili taskojn	2	4	8	5	19
Esti pli atentaj	-	-	-	5	5
Interesigi pri E kaj pri la Movado	1	3	5	4	13
Instrui la ideon	1	-	2	1	4
Korespondigi	-	2	4	4	10%
Ne scias, ne respondis	3	5	8	7	23

Kaj la lasta demando - speciale por helpi al propaganda fako:

IX. KIEL VI EKSCIIS PRI ESPERANTO?

De konatuloj kaj parencoj	29 h.
El gazeto	18
El anonco pri E-kursoj	15
En lernejo, en instituto	12
El libroj	8
El prelego	1
El televido	1
El murgazeto	1
Dum ekspozicio	1
Pere de turismo	1
Ne respondis	12

La plej efika okazis tamen individua propagando (denove faktoro de personeco). Ankaŭ gazetaj artikoloj kaj anoncoj estas bonega propagandilo.

La enketadon organizis kaj efektivigis Ufa E-klubo. La respondojn analizis kaj prilaboris N. Korĵenevskaja.

DE LA REDAKCIO

Geamikoj! Vi konatiĝis kun la rezultoj de la sociologia enketado, efektivigita en SEJT-16. La materialo estas interesega kaj enhavoriĉa. Vi legis opiniojn de E-"asoj" kaj de E-"freŝuloj", vi komparis vian respondon aŭ vian opinion kun tiu de amaso. Ofte ĝi malsamas al la opinio de la plimulto, ofte en respondoj vi trovis viajn kaŝitajn pensojn. Cerbumu kaj konkludu. Viajn rimarkojn, proponojn kaj opiniojn sendu al la organizintoj de la enketado (450025 Ufa-25, abon. k. 162, E-klubo). kaj al la Redakcio de "Aktuale".

Trarigardu refoje la materialon. La respondoj alarmas. Geamikoj! Ni ne scias la gramatikon. Ni stumblas ĉe uzado de akuzativo kaj tute ne scias uzi la difinitan artikolon. Ankaŭ aliaj eraroj abundas. Nia lingvonivelo estas tre malalta. Esperantistoj! Perfekta lingvoscio estas unu el gravaj kondiĉoj de nia progreso! Zorgu pri via E-klero!

Redaktis V.Ebel.

Redakcio: 656099 BARNAUL-99,
abon.k. 11,
"Aktuale"